# ”KATO EN LA SAKO”



- bezonatas: unu sako
- tempo: 15-20 minutoj

Gvidanto: - *”Ĉiuj fermu la okulojn kaj elektu unu objekton el sia sako, el inter la propraj aĵoj, kaj metu ĝin en mian sakon!”*

La gvidanto, prenas objekton el la sako, kaj diras unu gravan informon pri tio.

Poste la grupanoj rajtas demandi lin/ŝin tiel, ke li/ŝi povu respondi aŭ jese aŭ nee (ekz.: *”Ĉu ĝi estas blua?”* *”Jes./Ne.”*)

La demandado daŭras ĝis kiam iu diras: *”Ĝi estas mia…”*

Se la demandinto eraris pri la respondo, la objekto reiras en la sakon, kaj la homo, kiu eraris, ne plu rajtas demandi, sed havas ankoraŭ unu ŝancon por diri: *”Ĝi estas mia…”*

Se restas homo sen sia objekto, li/ŝi povas ricevi ĝin kontraŭ unu bona ŝerco.

BONAN AMUZIĜON!